

PARDONPETEMO KAJ PARDONEMO HELPAS KONSTRUI INTERNACIAN AMIKECON

Dum la ĉi-tiu jara Japana Esperanto-Kongreso estis interesa kaj fruktodona diskuto rilate al la japana-korea interrilato. Estas konate, ke la historio de tiuj du orient-aziaj landoj tute ne estis paca kaj amikeca, sed abundis konfliktoj kaj militoj inter ili dum multaj jarcentoj. Sed tio ne estas nur orient-azia fenomeno, ankaŭ la historio de multaj Eŭropaj landoj estis simila. Mi pasigis longan tempon kaj en Eŭropo kaj en Orienta Azio (mi estis studento de la japana Nanzan Universitato, poste mi instruis eŭropajn lingvojn kaj kulturon en la korea Indramang Universitato) kaj pro tio mi povas kompari la situacion en ambaŭ mondopartoj.

Laŭ miaj spertoj en Orienta Azio signifeca parto de la japana kaj korea loĝantaro ankoraŭ ne povis profunde amikiĝi kaj respekti la kulturon de aliuloj, sed en Eŭropo jam estas kelkaj ekzemploj ke iamaj malamikaj landoj sincere amikiĝis kaj forgesis siajn malbonajn historiajn konfliktojn. Laŭ miaj analizoj pardonpetemo kaj pardonemo ebligis en Eŭropo fini la konfliktojn kaj militojn inter diversaj iamaj malamikaj najbaraj landoj. Mi klarigas tion per du eventoserioj.

LA GERMANA HISTORIO

Granda parto de la eŭropa historio estas historio de permanentaj konfliktoj kaj militoj inter Germanio kaj ĝiaj najbaraj landoj. La germana-franca malamika interrilato daŭris dum multaj jarcentoj, kaj ankaŭ inter Germanio kaj Pollando estis malamikaj rilatoj, antaŭ la dua mondmilito Germanio eĉ okupis la okcidentan parton de tiu lando. Ankaŭ inter la germanoj kaj la judoj estis teruraj malamikegaj rilatoj, dum la dua mondmilito oni mortigis ses milionojn da judoj en germanaj koncentrejoj. Malgraŭ tiu malbona historio post la dua mondmilito la rilato inter Germanio kaj siaj iamaj malamikaj popoloj tamen rapide pliboniĝis. Okazis tiel, ĉar la oficiala germana ŝtatpolitiko grave ŝanĝiĝis en la dua duono de la lasta jarcento, kaj la oficialaj germanaj ŝtatestroj kaj registaroj emis pardonpeti kaj kompreni ke tute ne eblos solvi internaciajn konfliktojn per militoj. Germanio malvenkis la duan mondmiliton kaj la verkintoj serioze punis la gvidantojn kiuj repondeis pro la milito kaj pro la militaj krimoj, inkluzive la mortigojn en la koncentrejoj. Kaj Usono, Britio, Francio kaj Sovetio okupis la tutan Germanion. En tiu situacio okazis, ke en pluva tago en decembro 1970, germana ĉefministro Willy Brandt surgenuiĝis¹ antaŭ juda monumento en Varsovio, montrante sian pardonpetemon kaj respekton al la viktimoj de la iama nazia Germanio. Multaj politikistoj kredas, ke la vera pardonpeto de tiu Germana Ĉefministro inversigis la rilatojn kaj ebligis konstrui pacajn rilatojn inter Germanio kaj siaj iamaj malamikoj. Hungara ĵurnalisto tiam komentis, ke "*La germana ĉefministro surgenuiĝis sola, sed*

1 Surgenuiĝo estas simbolo de pardonpetemo kaj respekto en la Eŭropa kulturo.

*tiu ago fariĝis morala kaŭzo por la tuta germana popolo leviĝi.*²" Poste Germanio efike helpis plibonigi la vivon de siaj iamaj malamikoj, ekzemple subtenis, ke Pollando aliĝu al la Eŭropa Unio kaj la juda komunumo en Berlino pli libere vivis ol en aliaj Eŭropaj ĉefurboj. Ankaŭ la germana-franca rilato pliharmoniigis, nuntempe Germanio (kiu havas la plej fortan ekonomion en Eŭropo) kaj Francio en alianco gvidas la Eŭropan Union.

LA HUNGARA HISTORIO

Hungario estis parto de la aŭstria Habsburg-imperio dum kvarcent jaroj kaj la historio de Hungario estas historio de multaj bataladoj kaj militoj kontraŭ la aŭstriaĝermanoj. La plej grava milito inter Hungario kaj Aŭstrio okazis en 1848, kiam la hungaroj volis sendependiĝi de la Habsburg-imperio. Sed la hungaroj malvenkis kaj Franz Josef, la aŭstria imperiestro serioze punis la hungarojn kiuj bataladis kontraŭ liaj soldatoj. Oni mortpulis 13 generalojn, multajn oficistojn kaj politikistojn, kiuj gvidis la batalon kontraŭ Aŭstrio. Inter ili estis grafo ANDRASSY Gyula, kolonelo en la hungara armeo, kiu batalis kontraŭ Aŭstrio dum la milito. Post la fino de la malsukcesa hungara sendependeca milito li devis fuĝi el Hungario, kies teritorion la aŭstria armeo okupis. La imperiestra juĝejo mortpulis lin, sed ĉar li ne estis trovebla en la Habsburg-imperio, pro tio oni ekzekuciis la mortpunon simbole.

Sed post pli ol dek jaroj la Habsburg-imperio malfortiĝis, kaj oni pensis, ke alvenis tempo subskribi packontrakton inter Aŭstrio kaj Hungario. Laŭ hungara leĝo kaj tradicio la hungara reĝo estas rigardate kiel oficiale akceptata estro de la ŝtato se la du plej altrangaj gvidantoj de la lando (la estro de la publika administrado kaj la plej altranga religia estro de la lando) solene kronigas lin. Kaj en tiu solena ceremonio la reĝo devas promesi, ke li protektos la landon kontraŭ ĉiuj aliaj armeoj kiuj atakos Hungarion.

Tiel okazis, ke dudek jarojn post la malsukcesa hungara sendependeca milito Franz Josef, la aŭstria imperiestro kaj la hungara lando subskribis packontrakton (en la jaro 1867) kaj ANDRASSY Gyula, kiel reprezentanto de la hungara popolo kaj la katolika ĉefepiskopo solene metis la hungaran reĝan kronon sur la kapon de Franz Josef. Tiamaniere li estiĝis aŭstria imperiestro kaj samtempe ankaŭ hungara reĝo.

Kiel hungara reĝo li havis la devon laŭreati kaj honorigi la hungarojn kiuj efike kontribuis al la evoluo de la lando. El tiu vidpunkto li devis rigardi la hungarojn kiuj batalis kontraŭ la aŭstria armeo, kiel hungaraj patriotoj. Pro tio li, kiel hungara reĝo donis multajn distingojn kaj honorigojn al siaj iamaj malamikoj. Kaj li nomumis grafon ANDRASSY Gyula ĉefministro de Hungario. Temas pri la sama homo, kiun antaŭe la imperiestra juĝejo mortpulis, eĉ simbole ekzekuciis.

² Leviĝo estas simbolo de noblanimeco kaj prestiĝiĝo en la Eŭropa kulturo, do tio signifas ke la germanaj homoj ne plu estos rigardate kiel pekuloj kiuj kaŭzigis la mondmiliton kaj respondecis pro militkrimoj.

Post la subskribo de tiu packontrakto Hungario rapide evoluiĝis, kaj post kelkaj jardekoj la hungara ĉefurbo estiĝis bele konstruita mondurbo kie estis vigla kultura, komerca kaj scienca agado, kaj ankaŭ la eduka sistemo estiĝis altnivela. La sentoj de ordinaraj hungaraj homoj iom post iom ŝanĝiĝis, kaj nun ordinaraj hungaroj tute ne havas malamikajn rilatojn kontraŭ aŭstriaĵoj germanoj. Malgraŭ la fakto ke Hungario multe suferis dum kvarcent jaroj kiam Aŭstrio kontrolis la vivon en ĉi-tiu lando. Kaj la hungaroj kaj la aŭstriaĵoj germanoj emis pardonon unu al la aliuloj kaj celis harmonie kune agadi por plibonigi la vivkondiĉojn en ambaŭ landoj. Mi opinias, ke tiu historia sperto povus esti uzebla ankaŭ en Orienta Azio.

MÁRKUS Gábor